RADIO HABANA CUBA
Artículo Editado por Maritza Gutierres González
08/02/2017 07:17:39

Karibaj ludoj: Portoriko estas ĉampiono de basbalo.

Havano, 8 feb (ESPN-RHK) La teamo Criollo de Caguas de Portoriko venkis 1-0 la teamon Aguilas de Mexicali de Meksiko en 10 matĉeroj dum la fina matĉo de la Karibaj sportludoj 2017, ĉi-marde en emocia kaj dramoplena ludo okazinta en la stadiono Tomateros de Culiacán, Meksiko.

Kun pli ol 19 mil fanatikuloj subtenante la lokan teamon, la Criollos ne ĉesis en sia celo kaj gajnis la trian ludon decidigan, depost komenci kun perdoj de tri ludoj dum la tuta matĉ-serio.

Pli ol 130 mil amantoj pagis por ĉeesti unu el la klasikaj sportludoj de la kariba regiono kaj, ĉi-foje, la pli bone organizita dum la lastaj tempoj.

En la dua pozicio restis Meksiko, sekvis Venezuelo, Kubo kaj laste Dominika Respubliko.